A.I.T.

(Internacia Asocio de l' Laboro)

# LA REZOLUCIOJ
# DE LA
# KONGRESO DE SAINT-IMIER

(16-a/17-a de septembro 1872)

Teksto preparita de :

* Liberecana Frakcio de SAT

* Franca Nacia Konfederacio de la Laboro (C.N.T. - A.I.T.)

**SAT-Broŝurservo**

F 47470 Beauville

1990 * 3 FF

## ENKONDUKO

La unuan de septembro 1872, malfermiĝis en Hago la lasta kongreso de la Unua Internacio.

Post fulmrapida starto (1864) kaj ŝajna bonfarto, A.I.T. estis rodata de severa malsano : "la aŭtoritata viruso".

Invitite partopreni en la laboroj de la unua kongreso de 1864, Karl MARX kaj ENGELS estis sukcesintaj enkerniĝi en la Ĝenerala Konsilantaro, kiu, de Londono, plenumis la kunordigadon inter la diversaj federacioj.

Aliancigitaj kun la "Blankistoj", ili pretendis esti la ĉefoj de la laboristara armeo. Tiu netolerebla pretendo estis vigle kontraŭbatata de la plimulto el la filiaj federacioj, kiuj estis trovintaj en BAKUNIN sian plej oportunan ĉampionon.

Tiuj federacioj proklamis sin senkaŝe kontraŭ-aŭtoritataj kaj federalistaj.

Tiu kongreso de Hago estas per pluraj flankoj simbola. Estis tiam la epoko de grava rompiĝo inter la marksistoj kaj la anarkistoj. Ankaŭ, eble, la momento kiam estis elpensita metodo kiu estis fariĝonta fama, t.e. : la manovraĉado, aŭ... kiel akiri rajton de plimulto estante malplimulto.

Tiam, unuafoje, Karl MARX jen uzos malpurajn metodojn por forigi politikajn kontraŭulojn. Unue, li starigas komisionon por esplori la aktivadon de la ALIANCO kreita de BAKUNIN en 1869 senkaŝe de la publika opinio. Tiu komisiono ne kapablas demonstri kian ajn "kulpon" de BAKUNIN, sed tamen proponas ties eksigon de A.I.T. !

Poste, (ja tio reokazos mil kaj mil fojojn) MARX disfarĉos la kongreson per ŝajndelegitoj, esence francoj kaj

germanoj, dum la aktivado de la Internacio estas malpermesata en Francio kaj en Germanio kaj dum la vera identeco de parto el ili estas konata nur de MARX ! Jam ĉefverketo en l'okazo ! Tiamaniere, la delegitoj de la plej potencaj el la federacioj (hispana, ĵurasa, belga, nederlanda) iĝas minoritataj.

Neniel mirige estas, ke en tiuj kondiĉoj, James GUILLAUME (delegito de la ĵurasanoj) kaj Mikaelo BAKUNIN estis eksigitaj el la Internacio.

Fronte al tiu perforto, la federalistoj reagas fortege kaj unu semajnon post la fino de la Haga kongreso, ili organizas en SAINT-IMIER (svis-romanda Ĵuraso) la kongreson de la ĵurasa federacio. Ĉi tiu okazas la 15an de septembro 1872 kaj adoptas du rezoluciojn kiuj atestas ke: *"... la kongreso neniel ajn agnoskas la aŭtoritatajn povojn de la Ĝenerala Konsilantaro. Ĝi tuj laboros pri starigo de federa kaj libera pakto inter ĉiuj federacioj kiuj konsentos partopreni en ĝi... (Ĝi) energie protestas kontraŭ la eksigo de k-doj BAKUNIN kaj GUILLAUME kaj plu agnoskas ties econ de membroj de la Internacio kaj de anoj de la ĵurasa federacio..."*

Tuj post la fermo de ĉi tiu kongreso, dua komenciĝis, konata kiel la Kongreso de SAINT-IMIER, tiu de la kontraŭ-aŭtoritata Internacio. Ĝi kunigis jenajn delegitojn* :
ALERINI, FARGA PELLICER, MARSELAN kaj MORAGO, delegitoj de la hispana federacio ; COSTA, CAFIERO, BAKUNIN, MALATESTA, NABRUZZI, FANELLI, delegitoj de la itala federacio ; PINDY kaj CAMET, delegitoj de pluraj francaj sekcioj ; LEFRANÇAIS, delegito de la sekcioj 3 kaj 21 el Usono ; GUILLAUME kaj SCHWITZGUEBEL, delegitoj de la ĵurasa federacio.

Ĉi tiuj dek kvin delegitoj en du tagoj efektiviĝos la rompiĝon el la Ĝenerala Konsilantaro kaj adoptos kvar rezoluciojn. La du unuaj traktas pri la rilatoj sine de la Internacio kaj la du lastaj konsistigas manifeston por la

emancipiĝo de la laborista klaso kaj bazon por la revolucia lukto. Estis dirite, ke tiu teksto estas la naskiĝatesto de anarkismo. Sed estas ankaŭ dirinde, ke troviĝas en ĝi la ĉefaj ideo-fortoj de la anarkosindikatismo kaj de la revolucia sindikatismo.

Ĉiu frazo el tiu teksto estas grava. De antaŭ 117 jaroj ĝi absolute ne sulkiĝis. Parafrazado estus troa : ĝi estas densa kaj konciza.

De post 1872, multaj eventoj ŝancelis la mondon. Multaj anarkistaj kaj anarkosindikatistaj organizaĵoj naskiĝis kun kunlabormetodoj tre diversaj laŭ la lokoj kaj la epokoj. En 1872, niaj patroj la fondintoj, antaŭvidis nur unu organizacion, A.I.T. kaj unu celon t.e. la libera kaj spontana organizado de la laboristaro, ideo kiun Isaac PUENTE retraktis en sia broŝuro : "La liberecana komunismo".

En la tempo kiam la ŝtataj monstroj, starigitaj de la disĉiploj de Karl MARX, renversiĝas mondskale, la rezolucioj de la SAINT-IMIER-kongreso montriĝas lumplene antaŭavertaj.

Ili, pli ol kiam ajn, meritas esti ĉe la centro de niaj debatoj, de niaj pripensoj, de niaj agadoj.

* Laŭ la Bulteno de la Ĵurasa Federacio, n-roj 17-18, 15a de septembro - 1a de oktobro 1872.

# REZOLUCIOJ

## I-a

*- Konsiderante ke la aŭtonomeco kaj la sendependeco de la laboristaj federacioj kaj sekcioj estas la unua kondiĉo por la laboristara emancipiĝo ;*

*- ke ĉia leĝofara kaj reglamenta povo konsentita al kongreso estus nekontestebla neado de tiu aŭtonomeco kaj de libero, la kongreso rifuzas pro principo leĝofaran rajton al ĉiuj kongresoj jen ĝeneralaj, jen regionaj, agnoskante por ili neniun alian mision ol tiun konsistantan el kunfrontigo de celoj, bezonoj kaj ideoj de la diverslandaj aŭ diverslokaj proletaroj, cele al tio, ke ties bonharmoniiĝo kaj unuiĝo kiel eble plej estiĝu ;*
*Sed, majoritato de kiu ajn kongreso neniel povos altrudi siajn rezoluciojn al minoritato ;*

*- Konsiderante aliparte, ke starigo de ĝenerala konsilantaro en la Internacio estas pro sia karaktero propra nepre instigata fariĝi daŭra perfortado kontraŭ tiu libero, kiu devas esti la fundamenta bazo de nia granda asocio ;*

*- konsiderante, ke la agoj de la ĵus diserigita londona Ĝenerala Konsilantaro dum la tri lastaj monatoj estas viva pruvo pri la esence propra difekto de tiu institucio;*

*- ke, por pligrandigi sian - unue tre malgravan - potencon, ĝi helpis sin per intrigoj, mensogoj, kalumnioj plej malnoblaj cele makuli ĉiujn kiuj kuraĝis kontraŭbatali ĝin,*

*- ke, por sukcese plenumi fine siajn celojn, ĝi longe preparis la hagan kongreson, kies artifike aranĝita majoritato havis evidente kiel nuran celon triumfigi ĉe la Internacio la regadon de la aŭtoritata partio kaj ke, por atingi tiun celon, ĝi ne hezitis tretaĉi ĉian decon kaj justecon ;*

*- ke tia kongreso ne povas esti esprimo de la proletaro de la en ĝi reprezentitaj landoj ;*

*- La kongreso de la delegitoj de la hispana, itala, ĵurasa, usona kaj franca federacioj, kunveninta en Saint-Imier, deklaras ke :*

*Ĝi forpuŝas absolute ĉiujn rezoluciojn de la haga kongreso, neniel agnoskas la povojn de la nova Ĝenerala Konsilantaro nomita de ĝi kaj, por gardi siajn respektivajn federaciojn kontraŭ la regadaj pretendoj de tiu Ĝenerala Konsilantaro, same kiel por savi kaj plifortikigi la unuecon de la Internacio, la delegitoj elpensis la bazojn de paktprojekto de solidareco inter tiuj federacioj.*

## II-a

*- Konsiderante, ke la granda unueco de la Internacio baziĝas : Ne sur artifika organizado, nepre malbonfara, de ajna centraliziga povo, sed ja unuflanke, sur la reala interessameco de la ĉiu-landa laboristaro kaj, aliflanke, sur la spontana kaj absolute libera federiĝo de la federacioj kaj sekcioj ĉiulandaj ;*

*- konsiderante ke : sine de la Internacio ekzistas hodiaŭ tendenco, malkaŝe montriĝinta ĉe la haga kongreso far la aŭtoritata partio (tiu de la germana komunismo), tendenco strebanta substitui sian regadon kaj la povon de siaj ĉefoj al la libera elvolviĝado kaj al la spontana kaj libera proletara organizado ;*

*- konsiderante, ke la majoritato de la haga kongreso senhonte foroferis al la ambiciaj celoj de tiu partio kaj de ĝiaj ĉefoj ĉiujn principojn de la Internacio kaj, ke la nova Ĝenerala Konsilantaro, nomita de ĝi kaj investita de povoj eĉ pli grandaj ol tiuj kiujn ĝi estis volinta alpreni pere de la londona konferenco, minacas detrui la unuecon de la Internacio per siaj atencoj kontraŭ ĝia libereco,*

*- La delegitoj de la hispana, itala, ĵurasa, franca, usona federacioj kaj sekcioj konkludis en la nomo de ĉi-lastaj, jenan pakton de amikeco, solidareco kaj reciproka defendado :*

*1) La hispana, itala, ĵurasa, franca, usona federacioj kaj sekcioj kaj ĉiuj kiuj deziros aniĝi al tiu pakto havos inter si regulajn kaj senperajn komunikojn kaj korespondadon, tute sendependajn de ia ajn regantara kontrolo ;*

*2) Kiam unu el tiuj federacioj kaj sekcioj estos atakata en sia libereco, jen far la majoritato de ĝenerala kongreso, jen far la regantaro aŭ Ĝenerala Konsilantaro kreita de tiu majoritato, ĉiuj aliaj federacioj kaj sekcioj deklaros sin absolute solidaraj kun ĝi ;*

*3) Ili laŭte proklamos, ke la konkludo de tiu pakto havas kiel ĉefan celon la sanon de tiu granda unueco de la Internacio kiun endanĝerigis la ambicio de la aŭtoritata partio.*

## III-a

*- Konsiderante ke, voli altrudi al la proletaro kondutlinion aŭ politikan unuforman programon, kiel solan vojon povantan konduki ĝin al ĝia emancipiĝo, estas tiel absurda kiel reakcia pretendo ;*

*- ke neniu rajtas senigi la federaciojn kaj aŭtonomajn sekciojn je la nekontestebla rajto mem decidi kaj sekvi la politikan kondutlinion kiun ili opinias plej bona kaj ke, ĉiu simila provo kondukus nin al plej ribeliga dogmismo ;*

*- ke la aspiroj de la proletaro ne povas havi alian celon ol la starigon de ekonomiaj organizacio kaj federacio absolute liberaj kaj bazitaj sur la laboro kaj sur la egaleco de ĉiuj kaj, sendependaj de ĉia politika regado kaj, ke tiuj organizado kaj federado povas esti nur la rezulto de la spontana agado de la proletaro mem, de la korporacioj kaj de la aŭtonomaj komunumoj ;*

*- Konsiderante ke ĉia politika organizado estas organiz-*

*ado far la regado, profite al la klasoj kaj malprofite al la amasoj kaj, ke, se la proletaro volus akapari la politikan povon, ĝi mem iĝus reganta kaj ekspluatanta klaso,*

*- La Saint-Imier-a kongreso deklaras ke :*

*1) La detruo de ĉia politika povo estas la unua devo de la proletaro.*

*2) Ĉiu organizado de politika povo laŭdire provizora kaj revolucia, povas esti nur plia mistifiko kaj, estus tiel danĝera al la proletaro, kiel al ĉiuj hodiaŭ ekzistantaj registaroj.*

*3) Ke, forpuŝante ĉiun kompromison - strebe al efektivigo de la socia revolucio - ĉiu-landaj proletoj devas estigi ekster ĉia burĝa politiko, la solidaron de la revolucia agado.*

## IV-a

*La libereco kaj la laboro estas la bazo de la moralo, de la forto, de la vivo kaj de la riĉeco de l'estonteco. Sed, se ĝi ne estas libere organizita, la laboro iĝas prema kaj ne-produktiva por la laboristo. Tial, la organizado de la laboro estas nepra kondiĉo de vera kaj kompleta laborista emancipeco.*

*Tamen, la laboro ne povas okazi libere sen la posedo de la materioj kaj de la tuta socia kapitalo kaj ne povas organiziĝi, se la laboristo emancipiĝanta de la politika kaj ekonomia tiraneco, ne konkeras la rajton komplete elvolviĝi en ĉiuj siaj kapabloj.*

*Ĉar ĉiu ŝtato, t.e. ĉiu registaro kaj ĉiu administrado rilate al la popolamasoj estas nepre fonditaj sur la burokratio, sur la armeoj, sur la spionado, sur la eklezio ; ĝi neniam povos starigi socion organizitan sur la laboro kaj sur la justeco, tial ke pro la karaktero mem de sia organismo, ĝi estas nepre instigata subpremi tiun kaj nei ĉi tiun.*

*Laŭ ni, la laboristo neniam povos emancipiĝi el la subpremado, se li ne substituas al tiu sorbema kaj malmoraliga korpo la liberan federacion de ĉiuj produktantaj grupoj, bazitan sur la solidareco kaj sur la egaleco.*

*Efektive, jam en pluraj lokoj oni provis organizi la laboron por plibonigi la vivkondiĉojn de la proletaro, sed la eĉ plej eta pliboniĝo baldaŭ estis sorbita de la privilegia klaso, kiu daŭre strebas, senbremse kaj senlime, al ekspluatado de la laborista klaso. Tamen, la avantaĝo de tiu organizado estas tia, ke eĉ en la nuna stato de ĉio, oni ne povus rifuzi ĝin. Ĝi daŭre pli interfratigas la proletaron en la simileco de la interesoj, ĝi ekzercas ĝin en la kolektiva vivo, ĝi preparas ĝin por la superega batalo.*

*Krome, ĉar la libera kaj spontana organizado de la laboro estas tiu, kiu estas substituiĝonta al la privilegia kaj aŭtoritata organismo de la politika ŝtato, ĝi estos, post sia stariĝo, la daŭra garantio por la gardo de la ekonomia organismo kontraŭ la politika organismo.*

*Konsekvence, lasante al la praktiko de la socia revolucio la detalojn pri pozitiva organizado, ni volas organizi kaj solidarigi la rezistadon grandskale.*

*Striko estas por ni valora batalrimedo, sed ni tute ne iluziiĝas pri ĝiaj ekonomiaj rezultoj. Ni akceptas ĝin kiel produkton de la antagonismo inter la laboro kaj la kapitalo, havanta nepre kiel konsekvencon pli kaj pli konsciigi la laboristojn pri la abismo, kiu ekzistas inter la burĝaro kaj la proletaro, plifortigi la organizadon de la laboristoj kaj prepari la proletaron, fare de la simplaj ekonomiaj luktoj por la granda revolucia kaj definitiva batalo, kiu detruante ĉiajn privilegion kaj klasdiversecon, donos al la laboristo la rajton ĝui el la tuta produkto de sia laboro, kaj tiel, la rimedojn por elvolvi en sia kolektivo sian tutan intelektan, materian kaj moralan fortojn.*

*La komisiono proponas al la kongreso, ke ĝi nomu komisionon, kiu devos prezenti al la venonta kongreso pro-*

*jekton pri universala organizado de la rezistado kaj kompletajn tabelòjn pri la laborstatistiko, el kiuj la batalo ĉerpos lumon.*

*Ĝi rekomendas la hispanan organizacion kiel la plej bona ĝis nun.*

*Laste, la kongreso voĉdonas por jena fina rezolucio :*

*La kongreso proponas sendi kopion pri ĉiuj rezolucioj de la kongreso kaj de la Pakto de Amikeco, de Solidareco kaj de recipròka defendado, al ĉiuj laboristaj federacioj en la mondo, kaj interkonsenti kun ili pri la demandoj havantaj ĝeneralan intereson por ĉiuj liberaj federacioj.*

*La kongreso invitas la federaciojn konkludintajn inter si tiun pakton, tuj interkonsenti kun ĉiuj federacioj aŭ sekcioj pretaj akcepti tiun pakton por difini la karakteron kaj la epokon de sia internacia kongreso... esprimante la deziron, ke la kunveno okazu ne pli poste ol post ses monatoj.*

*Unu komisiono ĉerpita el la itala federacio havis kiel taskon prezenti al la venonta kongreso projekton pri universala organizado de la rezistado kaj ĝeneralan statistikplanon.*

*Fine, kamarado Adhemar SCHWITZGUEBEL, sekretario de la ĵurasa federacia komitato, ricevis la taskon subskribi ĉiujn aktojn de la kongreso kaj sendi kopion de ĝi al la diversaj federacioj.*

*Elĉerpinte sian tagordon, la Internacia Kongreso disiĝis kun la krioj :*

*"Vivu la socia revolucio !"*

Januaro 1990. Esperantigis kdo M.T.

* Liberecana Frakcio de S.A.T. :
  Eldonas : "**Liberecana Ligilo**"
  Adreso : Pelle PERSSON
  Svartviksvägen 14
  S-123 52 FARSTA (Svedio)

* S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda)
  67, av. Gambetta
  F-75020 PARIS

* C.N.T. (Confédération Nationale du Travail)
  33, rue des Vignoles
  F-75020 PARIS

* A.I.T. (Association Internationale du Travail)
  Internacia Asocio de la Laboro
  Postfach 101223
  PLK O9 28 22 A
  D-5000 KÖLN I
  (Tel: (0) 221 56 10 85

## ALIAJ TEKSTOJ DISPONEBLAJ ĈE SAT-Broŝurservo

Cercle espérantiste agenais, Cargue Sac, F-47470 BEAUVILLE

BALKANSKI. La Bazoj de Anarkiismo (148 p.)

MALATESTA. Anarkio kaj organizo kaj aliaj tekstoj (32 p.)

BAKUNIN. Elekto de tekstoj (1867-1873) (58 p.)

DOMELA NIEUWENHUIS. La Piramido de l'Tiranismo (32 p.)

KROPOTKIN. Ĉu revolucia registaro aŭ anarkio ? Anarkista agado en la Revolucio. La Pariza Komunumo. Ktp. (56 p.)

E. ARMAND. La Antaŭvenantoj de Anarkiismo (18 p.)

HAN RINER. Individuista Manlibreto (36 p.)

E. ARMAND. Nia individuismo. Ĝiaj depostuloj kaj tezoj per demandoj kaj respondoj (32 p.)

PARIO. Durruti, simbolo de la hispana revolucio (24 p.)

MURRAY BOOKCHIN. Por ekologia socio (120 p.)

KROPOTKIN. Etiko I (132 p.)

Sébastien FAURE. La Krimoj de Dio (32 p.)

LA BOÉTIE. Memvola Servuto (32 p.)

(Plena katalogo kun specimeno de la revuo **Laŭte!** kontraŭ 2 irpk)



Presis : Baudé, F 47470 Beauville